

La gvidilo estis origine verkita leŭ komisio de NORDTERM, komuna asocio de terminologiaj organizoj en Nordio. La Esperanto-version preparis Terminologia Esperanto-Centro de UEA kunlabore kun la aŭtorino.

Recenzis Detlev Blanke kaj Heinz Hoffmann

Heidi Suonuuti (1998): Terminologia gvidilo. El la angla tradukis Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke. Rotterdam: UEA. 38 + 4 paĝoj. ISBN 92-9017-057-3. Prezo: 12,00 guldenoj. (Triona rabato ekde 3 ekzempleroj)



Feliĉan Kristnaskon
La varma, bela
kandela lumo
brilu tra feliĉaj festotagoj!

Por 1999 niaj plej karaj
deziroj estu paco,
paco ĉie en la mondo.

Sanon al vi kaj viaj karaj
en la Nova Jaro!

Dankon pro via fidela kunlaboro.

Restu ankaŭ en 1999 kuraĝe je nia flanko.

Nia strebado tutcerte gvidos al konstanta sukceso.

La ĝis nun atingitaj rezultoj pravas tion.

Terminara - Kuriero

TeKu 106

Decembro 1998

Gvidanto: D-ro Halász József, Mükely-u. 14, HU-3529 MISKOLC.
Sekretario terminaraj aferoj: D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2, DE-01445 Radebeul
Redaktoro TK: Heinz Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, DE-28279 Bremen

Retrospegulo

Raporto de d-ro Heinz Hoffmann

En somero 1998 UIC donis 303 novajn nociojn por 3-a eldono de la datum-banko RailLexic. Ĉefe temas pri AT = ĝenerala tekniko, BT = konstrua tekniko. MT = maŝintekniko, NT = telekomunika tekniko, PR = infrastrukturo kaj \ = laborejoj. La terminoj aperis en angla, franca kaj germana. Ĝis fine de 1998 estu liverataj tradukoj en en aliaj lingvoj, do ankaŭ ni liveru ilin en Esperanto. Difinoj estas aldonitaj ĉe bedaŭrinde nur 164 nocioj - kaj multkaze ne en ĉiuj 3 bazaj lingvoj.

Kunlaborantoj el Aŭstrio, Danio, Germanio kaj Rumanio faris la unuajn, entute **291 tradukproponojn**. 12 nocioj ankoraŭ vakas, ĉar ili estas difinitaj nur franclingve. Por obei al la limdato de UIC kaj sekve konservi nian prestiĝon, estas enigataj en 3-a RailLexic la 291 terminproponoj. Ekster tio, finfine aperos la korektoj laŭ nia lasta revizio inkluzive decidoj el 50-a IFEF-kongreso. **Estontaj bazfolioj** havos pli da enhavo, nome: RailLexic-numero, fakokodo, difino en Esperanto, angla, franca, germana terminoj kaj terminpropono en Esperanto. Tiel kunlaborantoj ricevos sufiĉajn informojn por bonkvalita revizio. Por la **nova bazfolio 12357 - 12689** ĝis nun estas tradukitaj nur tiuj 86 difinoj, kiuj aperis germanlingve. Por traduki la restantajn 78 difinojn el angla aŭ franca, la sekretario petis kelkajn kolegojn. Li volas disdoni la bazfolion nur, kiam sukcesis la tradukoj. Celo estu, fini la revizion en 51-a IFEF-kongreso. Eventualaj terminkorektoj aperos en 4-a eldono de RailLexic.

Notu bone:

Sekretario d-ro Hoffmann nun havas retadreson:

IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Konferenco honore al Eugen Wüster

Heinz Hoffmann; Karl - Hermann Simon

Sub la kadra temo „Faka komunikado kaj scio-transdono - ProCom`98“ de 24-a ĝis 26-a de aŭgusto 1998 en Vieno okazis „duobla konferenco“ organizita omaĝe al Eugen Wüster (1898-10-03....1977-03-29) okaze de centjariĝo de lia naskiĝo. Eugen Wüster ja estas la fondinto de terminoligo-scienco

kaj tre grave kontribuis al planlingvoj (interalie „Enciklopedia Vortaro, Esperanto-Germana).

Verŝajne la unuan fojon en sia historio, Esperanto estis bone reprezentata, kaj ĝiaj fakuloj ludis aktivan kaj plene akceptitan rolon ĉe prestiĝa internacia konferenco en la medio de terminologio-scienco.

La konferencon kunorganizis interalie Universala Esperanto-Asocio kaj la germana „Societo pri Interlingvistiko“.

Kvar lingvoj estis oficialaj: angla, germana, franca kaj Esperanto. Kompreneble regis la angla, iom ludis rolon la germana. La francan kaj Esperanton oni uzis nur po unu prelego.

En la sekcio 3 de la konferenco - „Terminologio-scienco kaj planlingvoj“ estis prezentataj jenaj prelegoj:

1. „Problemoj de la organizado de la terminologiaj aktivecoj en Esperanto“ (Wera Blanke)
2. „Pri la prezento de latinaj kaj grekaj propraj nomoj en la Enciklopedia Vortaro de Wüster“ (Otto Back)
3. „Eugen Wüster kiel leksikografo: rolo kaj prezento de frazeologio en la Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana“ (Sabine Fiedler)
4. „Eblecoj de planlingvo ĉe inter-lingvaj nocio-diferencoj - ĉe ekzemplo de fervojaj terminoj“ (Heinz Hoffmann)
5. „Principoj de la multlingva forstscienca vortaro 'Lexicon silvestre'“ (Karl-Hermann Simon)
6. „Nomoj de plantoj kaj bestoj en Esperanto: la konceptoj de Wüster kompare kun tiuj de aliaj terminologoj“ (Wim de Smet)
7. „Pri la planlingva postlasaĵo de Eugen Wüster en la Austria Nacia Biblioteko“ (Herbert Mayer)

La prelegoj 4 kaj 5 traktis terminologiajn problemojn de speciala fako cele krei taŭgajn fakvortarojn: En forstfako agas d-ro Simon kun internacia grupo da forstfakuloj sur vojoj de Eugen Wüster. El ties ekkono estiĝis la principo, ke la bazo de terminologia laboro estu nocioj, do homaj ideoj pri objektoj kaj okazoj. Nomoj, terminoj estu sekundaraĵo. Laŭ tiuj ekkonoj la grupo ellaboras forstfakan leksikonon „Lexicon silvestre“. Ĝis nun estas prezentita 1-a parto en 10 lingvoj. En la Esperanto-versio estas fiksitaj la en faklingvo alstrebendaj aŭnormaj terminoj jam por ĉirkaŭ 2000 nocioj.

En fervojfako ekzistas granda terminaro de Internacia Fervojunio (UIC). En ĝi troviĝas Esperanto kiel unu el 14 lingvoj. Sed la terminaro estiĝis bedaŭrinde sen konsideri la principojn de Wüster. Tio kaŭzas multajn miskomprenojn pri nocioenhavoj de terminoj, precipe pro inter-lingvaj nocio-diferencoj. Nur ekde 1995 UIC donas al novaj terminoj difinojn internacie validajn. La terminara sekcio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (sekretario d-ro Hoff-

mann) kiel ano de nova terminologio-grupo de UIC klopodas kontribui por paŝe internacie harmoniigi gravajn fervojfakajn nociojn. Esperanto relative bone taŭgas por tia harmoniigo - ne nur pro avantaĝoj de planlingvo, sed ankaŭ pro la fakto, ke ĝi ne estas lingvo de naciaj leĝoj kaj reglamentoj kaj pro tio permesas krei terminojn sen obei al sole naciaj difinoj. Per tiuj laboroj kun aliaj fakuloj, esperantistoj paŝe kreas sian agnoskon kiel egalvaloraj partneroj kaj la ekkonon, ke Esperanto estas serioza komprenilo.

Estis tre ĝojige konstati, ke ankaŭ en diversaj prelegoj de neesperantistoj estis menciata la laboro de Wüster por kaj pri Esperanto kaj la influo de planlingvoj al lia scienca verko. Tion ankaŭ tre bele montris la ekspozicio „la Vortigo de la mondo - la Ordigo de la scio“ pri la vivo kaj verko de Wüster.

DeViga por fakvortaristoj kaj termino-kreantoj

UEA eldonis gvidilon por krei fakvortojn

Altkvalita faka apliko de Esperanto estas esenca kondiĉo por pli rekoni la valorojn de Internacia Lingvo. Sekve necesas faktekstoj kun taŭgaj fakvortoj, fakvortaroj kun bonaj terminoj. Sed, kie oni komencu? Kie oni trovu fidindajn informfontojn? Kiujn informojn oni kolektu? Kiel oni tenu la diversajn lingvojn apartaj, skribu difinojn kaj organuzu la tutan terminokrean procedon?

Respondojn al tiuj kaj aliaj demandoj en klara kaj facile komprenebla formo, surbaze de la aktualaj normoj de ISO (Internacia Organizo por Normigado), donas la finnino Heidi Suonuuti, multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj prezidantino de Teknika Komitato ISO/TC 37. La 42 paĝa broŝuro „Terminologia gvidilo“, entenas jenajn ĉefajn ĉapitrojn:

1. Nocio-analizo
2. Difinoj
Multaj ekzemploj klarigas la sisteman karakteron de difinoj, montras la necesan koncizecon kaj prezentas nekontentigajn difinojn.
3. Terminoj
4. Harmoniigo de nocioj kaj terminoj
Por internacia terminologia laboro precipe gravas, ke harmoniigo de nocioj ĉiam inkludu komparon de diversaj nocio-sistemoj kaj neniam inkludu rektan transigon de unu nocio-sistemo al alia lingvo.
5. Etapoj de terminologia projekto
- 6 Terminografio

Aldonitaj estas vortareto de terminologio kaj elprenebla faldfolio kun la plej gravaj 38 paŝoj en la terminologia laboro.